INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 - 29 andar - Tel. 232-6309 20.211 - RIO DE JANEIRO - BRASIL



LA MOVADO ANKAŬ VIGLE PULSAS EN CAMPINA GRANDE

"Antaŭ tri jaroj, ni komencis instrui Esperanton en nia urbo. Pasintjare, ni fondis "KUNIGI-LO ESPERANTO-KLUBO"-n. Kaj, nun, ni havas proksimume 20 gesamideanojn laborantajn por la disvastigo de Esperanto".


Tiel, komenciĝas entuziasma letero de S-anino Maria do Socorro Paz, el Campina Grande, Para<u>f</u>ba.

Krome, ŝi ankaŭ informas ke la klubanoj regule vizitas aliajn ne—esperantistajn grupojn aŭ klubojn, prelegante pri la internacia lingvo.

Cetere, la agado de KUNIGILO ESPERANTO-KLUBO (Caixa Postal 277, Campina Grande, Paraiba) ne haltis tie. La 7-an de septembro, 55 gelernantoj, organizitaj de la Klubo kaj portantaj afiŝojn kun portugallingvaj tekstoj pri la lingva problemo kaj pri esperanto, paradis sur la ĉefaj stratoj de Campina Grande.

Fine, menciinda estas la laboro de la esperanta pioniro en tiu urbo, S-ano Afonso Camboim, kiu aperigis ampleksajn raportojn pri Esperanto en la gazetoj "A União" de João Pessoa (la 26-an de aŭgusto) kaj "Revista Tudo" de Campina Grande (la 30-an de septembro) kaj ankaŭ sukcese prelegis pri la temo "Projetos de Lingua Internacional e o Esperanto" en la "VII Congresso Brasileiro de Teoria e Critica Literárias".

Jen instigaj kaj sekvendaj ekzemploj! Gratulojn al niaj samideanoj de Paraiba!



NOVAĴOJ PRI BEL

PASTRO PEDRO H. URBAITIS VIZITIS NIN - La 4-an de okt. vizitis nin Pastro Urbaitis kiu estas la direktoro de "Brazila Katolika Esperanto-Bulteno". Interalie, li informis nin pri la elek o, en Campinas, okaze de la XX Brazila E-Kongreso, de la unua estraro de Brazila Esperantista K to-lika Organizo: Euclides Carneiro da Silva (Prezidanto), Yolanda Evangelista Silveira (Vic-Prezidanto), Angela Rodrigues (Kasisto) kaj Eluizio B. Rodrigues (Sekretario). Pastro Urbaitis invitas al ĉiuj brazilaj katolikaj esperantistoj aliĝi al B.E.K.O (Caixa Postal, 234, 18.100-SOROCABA,SP).

DECIDOJ DE LA ĈENERALA KUNSIDO DE BEL - Okazinta la 20-an de oktobro, kun la ĉeesto de ĉirkaŭ 25 personoj, la Ĉenerala Kunsido de BEL prenis la jenajn decidojn: a) aprobo de la Financa Raporto rilate al 1983; b) aprobo de la Buĝeto por 1985; c) elekto de S-ano Mario Ritter Nunes kiel kunordiganto de Komitato kiu prizorgos la Programon de la Ligo por la Jubilea Jaro.

DONACOJ AL BEL, EN OKTOBRO - Jorge Monteiro O. da Silva: Cr\$ 25.000; Ely Figueira (RJ): Cr\$ 2.000; Ramiro Oliveira (SP): Cr\$ 360; Fernando Marinho(RJ): Cr\$ 360; Alœbiades G.Lopes (RJ): Cr\$ 1.000.

LIVERITAJ DIPLOMOJ, EN OKTOBRO - Baza Kurso: 04; Progresiga: 01.

ALIGOJ/ABONOJ, EN OKTOBRO: El Popola Ĉinio: 02.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ, EN OKTOBRO: 65 enspeznotoj; 07 rembursaj enspeznotoj; 08 fakturoj kaj 46 leteroj.

BEL/MEMBRARO/Stato je la 31-a de oktobro:

	M-S	<u>M-1</u>	<u>M-2</u>	D-M	B-M	Entute
dis 30/09/84	269	143	23	32	04	471
En oktobro	_15	3	_1		_	_18
	284	146	24	32	04	489
Gis 31/12/83	288	135	23	30	02	478

MALLONGE PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE PRI LA BRAZILA MOVADO MAL

DATREVENO DE ZAMENHOF, EN RIO DE JANEIRO - La 16-an de Decembro, Esperanta Grupo I.G. Braga, kun la apogo de BEL kaj KKE, okazigos kunfratiĝan tagmanĝon ĉe la bieno "Esperanto" (Estrada Guandu do Sena). Pliajn detalojn pri tiu evento ĉe KKE (tel.: 220.7486) aŭ en la sidejo de E-Grupo I. G.Braga (Rua Silva Cardoso, 673, Bangu).

PER BICIKIO TRA BRAZIIO - S-ano Alexandre Miguel Carneiro (Rua Manoel Barreto, 98 apt? 202, Graça, SALVADOR, Bahia) decidis entrepreni biciklan vojaĝon tra Brazilo kun la œlo disvastigi esperanton. Tial, li petas al ĉiuj kiuj povas iamaniere helpi lin en tiu entrepreno kontakti lin per letere.

ESPERANTO EN "DIÁRIO POPULAR" DE PELOTAS - Per letero de la 7-a de oktobro, Esperantista Societo de Pelotas informis nin ke danke al iniciato de S-ro Newton Peter (Jornal Diário Popular, Rua 15 de Novembro, 718, 96.100-PELOTAS, RS) estis enkondukita en tiu gazeto semajna rubriko pri E-o. Pro tio, la Societo petas ke oni sendu gratulleteron aŭ telegramon al S-ro Peter. Cetere, la 29-an de septembro, estis enpostenigita la nova estraro de tiu Societo, sub la prezidanteco de S-ano Paulo Domingos Caruso.

NAÜDEK PERSONOJ LERNAS E-ON EN PORTO ALEGRE - Laŭ informo aperinta en "Boletim do DESSEAK, sep/84" (Departamento de Esperanto da Sociedade Espírita "Allan Kardec", Rua Andrade Neves, 60, 90.000-PORTO ALEGRE, RS), 90 personoj enskribiĝis en la nova baza kurso organizita de DESSEAK. La lecionoj okazas ĉiusabate, sub la gvidado de S-ano Cesar D. Soares. Nuntempe, funkcias tie kvar bazaj kaj unu perfektiga kursoj, krom ankaŭ "konversacia renkontiĝo" ĉiusabate, je la 16h15m.

EN SALINÓPOLIS (PA), LA I-a KULTURA ESPERANTO-FERIEJO - Sub la aŭspicio de KEZ okazos, de la 2-a ĝis la 4-a de novembro/84, la Unua Kultura E-Feriejo. Sub la devizo "Feriu matene, studu vespere kaj artu nokte", la E-Feriejo elektis kiel ĉeftemon "La Esperanta Movado en Pará - Kiel antaŭenigi?"

MULTFLANKA LABORO POR ESPERANTO, EN SÃO PAULO - Laŭ "Boletim Informativo da Associação Paulista de E-o, julio/sep/84", okazas nuntempe diversflanka laboro por E-o en la ĉefurbo de la ŝtato. En la sidejo de APE, funkcias, nuntempe, kvin kursoj: 2 bazaj, 1 supera kaj 2 pedagogiaj. Ĉe du spiritistaj societoj ("Três de Outubro" kaj "Casa do Caminho"), sub la aŭspicio de APE, okazas tri bazaj kursoj. En la kultura kampo, la agado de APE ankaŭ estas tre aktiva: ĉiusabate, je la 17-a horo, okazas konversaciaj rondoj. Kaj, en la lasta sabato de ĉiu monato, la tradicia kultur-kunveno, kun prelegoj kaj debatoj. Fine, ĵus aperis, plena je interesaj artikoloj, nova numero (julio-sep/84) de "La Lampiro", trimonata organo de APE.

ESPERANTO ĈE BANCO DO BRASIL - La 26-an de oktobro, S-anoj Jorge das Neves kaj Ruy Albuquerque prelegis al ĉirkaŭ 20 personoj pri E-o ĉe AABB-Rio (Associação dos Funcionários do Banco do Brasil).

"VALDOMIRO LORENZ" LANĈIS NOVAN LIBRON - Laŭ informo en "Komunikoj, nº 35, 30/9/84, aperis, antaŭ nelonge, nova titolo ĉe Societo Spiritista F.V.Lorenz: temas pri la verko "La Vojo al Feli
co" de la brazila filozofo Huberto Rohden.